

Centra Organo de Japana Esperanto-Junularo (JEJ)
Fondita en 1992 Landa Sekcio de TEJO

La Junuloj

VINTRO
2011

RAPORTOJ

de **KS 2010**
en **VJETNAMIO**



Ni kondolencas tiujn, kiujn suferigas la granda tertremo de orientjapanio kaj rilataj katastrofoj. Estraranoj de JEJ

東日本大震災で被害を受けた方々にお見舞い申し上げます。 JEJ 役員一同

Al Facebook multaj homoj tra tuta mondo sendis mesaĝojn en Esperanto por popolanoj atakitaj de la lastaj katastrofoj, kaj ankaŭ aliaj ĉiuj en Japanio. En la jena retejo tiuj mesaĝoj estas tradukitaj en la japanan kaj publikigitaj.

「日本のみなさまへ」 <http://gambare-nippon.tumblr.com/>

執筆者紹介 Gaja Gaja



藤森耕平 FUJIMORI Kohej
Renkonto kun VjetnamioP.3

En la vasta kosmo ni ĉiam atendas vin.



工藤璃輝 KUDOU Riki
KS donis memcerton de Esperanto
.....P.6

Mi estas studento de Tokia Instituto de
Teknologio.



谷島博 JAĜIMA Hiroŝi
Intervjuodorso
KasraportoP.2
Pardonegon pro malfrua disdono!
Tion kaŭzis mia maldiligenteco.

会費振込

郵便振替口座：00140-8-755070

加入者名：JEJ

会費：正会員（35歳未満）1500円/年

高校生まで 400円/年

新規入会者 750円/年（初年度のみ）

賛助会員（35歳以上）2000円/年

Ĝiri kotizon

Japana poŝtoĝira konto, Numero: 00140-8-755070

Nomo de konto: JEJ

Kotizo: Regula membro (malpli ol 35-jaraĝa) 1500enoj/jaro

Ĝis altlerneĵano 400enoj/jaro

Novmembriĝinto 750enoj/jaro (nur en la unua jaro)

Subtenanto (35-jaraĝa kaj pli) 2000enoj/jaro

IJK が日本で開かれます！

2012年の第68回国際青年大会(IJK)は日本で行われます。JEJが組織します。JEIなどから様々なご支援をいただきます。日本でのIJKの開催は1965年、滋賀県大津市で行われて以来二度目です。

IJK okazos en Japanio!

En la 2012a jaro la 68-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Japanio. Organizos ĝin JEJ kun diversaj helpoj de JEI ktp. Ĝi estas la dua IJK en Japanio. La unua okazis en la 1965a jaro en Ōtsu, Shiga.

電子版について

今号の電子版を公開しています。詳しくは下記 JEJ のウェブページをご覧ください。

Pri reta versio

Ni publikigis retan version de ĉi tiu numero. Bonvolu vizitala retejo de JEJ (skribita sube).

今号の発行が大幅に遅れたこと、お詫び申し上げます。
Ni kore pardonpetas pro tre prokrastita eldono de tiu ĉi numero.

La Junuloj 2011 年冬号 (第 89 号)

2011 年 4 月 20 日発行

編集 藤森耕平 (補助: 谷島博)

発行 日本エスペラント青年連絡会

〒162-0042 東京都新宿区早稲田町 12-3

エスペラント会館 気付

メールアドレス jej_kontakto@yahoogroups.jp

ウェブページ <http://www.jej.jp>

La Junuloj vintro 2011 (n-ro 89)

La 20an de aprilo, 2011 eldonita.

Redakto: FUJIMORI Kohej (helpo: JAĜIMA Hiroŝi)

Eldono: Japana Esperanto-Junularo

JP-162-0042, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku,

Tokio, Japanio

Ret-adreso: jej_kontakto@yahoogroups.jp

TTT-ejo: <http://www.jej.jp>

あなたも記事を書いてみませんか？

「La Junuloj」では皆様の投稿や感想を募集しています。

左記宛先までお送りください。

Kontribuu per via artikolo!

Ni atendas vian artikolon kaj impreson pri tiu ĉi organo! Bonvolu sendi ĝin al la maldekstra adreso.

KASRAPORTO de la 2009a kaj 2010aj jaroj

2009・2010 年度会計報告

Mi kalkuris 2 jarojn kune (2009 kaj 2010), ĉar JEJ ne agadis en 2009. Kiel ni anoncis en 'La Junuloj' n-ro 89, kotizojn, kiuj estis pagita por la 2009a jaro, mi kalkuris kiel por la 2010a.

unu : eno (単位 : 円)

Elspezo (支出)

Fari T-ĉemizojn (T シャツ 製作費)	56,175
Fari 'La Junuloj' -n (機関誌製作発送費)	105,268
Teni domajn nomon (ドメイン契約更新料)	3,900
Lui servilon レンタルサーバ利用料	1,500
Reklamfolio por Global Festa (グローバルフェスタチラシ製作費)	2,000
Sumo (計)	168,843

Enspezo (収入)

Transportita sumo minus la diversaj (繰越金 - 雑費)	992,391
Kotizoj de membroj (会費)	35,750
monofero (寄付)	3,500
Sumo (計)	1,031,641

Enspeza sumo minus elspeza sumo (収入合計 - 支出合計)

862,798

Raportas JAĜIMA Hiroŝi, kasisto.

**ANONCO****Partoprenu IJK en Ukrainio!**

Internacia Junulara Kongreso en tiu ĉi jaro okazos en Kijivo, Ukrainio en la 14a - 21a de julio. Eble iu el estraranoj de JEJ partoprenos kaj reklamos pri IJK en Japanio. Ni ĝojos, se vi partoprenos Kijivan IJK kaj kunlaboros kun ni. Se vi estas malpli ol 30-jaraĝa, por flugkotizo ktp vi povas utiligi Fondaĵon de JEI por junuloj agi internacie (青年エスペ란チスト国際行動基金). Bonvolu vidi la jenajn retejojn.

今年の国際青年大会はキエフ。是非一緒に参加しましょう！ 30歳未満の人は、旅費その他の補助としてJEIの「青年エスペ란チスト国際行動基金」が申請できます。詳しくは次のホームページ。

●Kijiva IJK

<http://www.ijk-67.retejo.info/loko>

●青年エスペ란チスト国際行動基金

<http://www.jei.or.jp/hp/reguloj/seinen-koudou.htm>
Kandidatoj de novaj estraranoj

La jenaj personoj kandidatiĝis kiel novaj estraranoj. Se ne venos al JEJ kontraŭopinioj de pli ol duono de regulaj membroj ĝis la 31a de majo, ni pensos, ke ili estas rekonitaj. Se vi volas sendi opinion, la adreso estas en P1 sube.

新役員立候補者です。5月31日までに正会員の半数以上から不承認の意見が寄せられなければ承認されたと思えます。

Prezidanto : OKABE Akiumi (岡部明海)

Redaktoro : FUJIMORI Kohej (藤森耕平)

Sekretario : UEDA Hiroaki (植田浩明)

ĈE Juna (崔裕娜)

Kasisto : JAĜIMA Hiroŝi (谷島博)

Renkonto kun Vjetnamio

FUJIMORI Kohej



2010年12月18日から20日にかけて、ベトナムのハノイで東アジア青年エスペラント合宿(KS)が開かれました。藤森耕平のレポートをお届けします。

La 29a Komuna Seminario okazis en Hanojo de la 18a ĝis la 20a de decembro lastjare. Partoprenis 20 kaj kelkaj personoj el 5 landoj. Vjetnamoj, japanoj, ĉinoj, koreoj kaj indonezianoj. El Japanio 4 partoprenantoj.

Alveno

Ĉi tiu vojaĝo estis mia unua alilando. Ni alvenis al la flughaveno Noi Bai. Mi kunvojaĝis kun s-ro KUDOU Riki. Unua impresoj de Vjetnamio estas flari fumodoron. Post reveno al hejmo mi aŭdis de mia onklo, ke japana flughaveno estas unusola senodora flughaveno en la tuta mondo. Ni elaviadiliĝis kaj envjetnamiĝis. Tiam paspermeso de envjetnamiĝo estis malstrikta. Do ni facile povis eniri al Vjetnamio. Riki ne pensis, kiel ni kaj vjetnamoj renkontiĝos en flughaveno. Ni kaj vjetnamoj ne konis reciproke. Sed mi kunportis “Verdan standardon”. Ĝi estis tre utila. Kiam mi disvolvis la standardon, tiam jam nia vizaĝo estis kontraŭ vizaĝo de iu vjetnamino. Kaj ŝi diris al ni “Saluton!”

Forpreni nian pasporton

Kiam ni alvenis al hotelo, ni devis transdoni niajn pasportojn al akceptulo. Ĝis tiam mi tre singarde portis

mian pasporton, sed mi supozis, ke tio estas vana. Mi surpriziĝis de forpreno de mia pasporto. Nia ĉambro estis triopa. S-ro KIM Young-Long el Koreio, Riki kaj mi. Mi aŭdis, ke Young-Long vojaĝis dufoje al vjetnamio. Do mi demandis al Young-Long, ĉu oni devas transdoni sian pasporton al akceptulo en Vjetnamio. Li respondis, ke en Vjetnamio tio estas ordinaro afero, trankviliĝu. Mi provizore trankviliĝis. Tie ni estas same alilandano kontraŭ vjetnamio. Do mi povis kredi Young-Long. Nun por mi ĉiuj esperantistoj ĉe KS estas kredindaj. Sed tiam ĉar estis mia unua sperto de alilando, mi tre nervozigis. Do mi ne sciis, kiun mi kredu.

Eraro de Young-Long

En antaŭtagmezo de la dua tago ni estis libera ĝis malfermo de KS. Do ni decidis promeni ĉirkaŭon kun s-ino Unika el koreio. Unue ni iris al banko ŝanĝi monon en vjetnaman dongon. Posedi vjetnaman dongon eksterlande estas malpermesite. Do ni ne povis gajni



La hotelo, kie partoprenantoj loĝis.

dongon en nia lando. En la banko Young-Long ege helpis min. Kompreneble bankisto ne povas paroli Esperanton. Do ni devis trakti angle aŭ vjetname. Sed neniu povas paroli vjetname. Kaj Riki kaj mi ne povis trakti angle pro malalteco de kapablo de la angla. Do anstataŭ du japanoj du koreoj traktis monŝanĝon. Young-Long helpis min, kaj Unika helpis Riki. Post afero de la banko ni venis famŝajnan lagon. Tie akcidento okazis. Aperis bananavendistino portante du korbojn kiuj pendas sur bastono. Ŝi montris siajn korbojn kaj afable surmetis la bastonon sur ŝultro de Young-Long por memoraĵfoti. Post tio ni ĉiuj fotis reciproke portante la korbojn. Laste Young-Long aĉetis bananon. Tiam li erare 200,000 dongojn pagis al la vendistino. 200,000 dongoj estas ĉirkaŭ 1,000 enoj. La vendistino duonforiris ne redonante redonomonon. Kompreneble Young-Long diris angle, “redonu mian monon!” Sed ŝi obstine ne redonis. Li diris denove, “redonu mian monon!” Finfine ŝi redonis monon. Sed tio estis nur 1,000 dongoj! Li ne akceptis kaj diris samajn vortojn. Ĉi-foje ŝi redonis 3,000 dongojn kaj diraĉis, ke unu foto estas unu dolaro. Kompreneble li kolere ne akceptis monon. Tia traktado daŭris dum 20 minutoj. Finfine ŝi redonis 150,000 dongojn al li. Ŝi frapetis lian brakon kaj foriris. Post tio ni daŭrigis promenon. Kiam ni atingis loĝkvartalon ni vidis parkon kaj benkon. Ni decidis iom ripozi. Apenaŭ ni sidiĝis sur la benko, du vjetnamoj subite komencis badmintonon antaŭ ni. Unu estas juna, kaj la alia estas maljuna. Mi sentis strangecon. Sed alia tri ne sentis tiel. Finfine nenio okazis, estis simple serena sceno.

S-ro Hori alvenis

Malfermo de kongreso estis prokrastita. Ni atendis en salono de la hotelo. Tiam s-ro Hori Yasuo alvenis el



La strato proksime de la hotelo de partoprenantoj

gubernio Gumma. Ĉar poste oni informis tempon de la malfermo al ni, s-ro Hori, Riki kaj mi decidis promeni straton ĝis alveno de taksio al la kongresejo. Dum promenado s-ro Hori klarigis, ke antaŭ 10 jaroj 80 procentoj de veturilo estis biciklo, sed nun 80 procentoj estas motorciklo. Kaj li ankaŭ klarigis pri oranĝkolora maso mult-truita, kiu estis forĵetita sur strato. Ĝi estis brulinta karbobriko. Ĝi estis kaŭzo de la malbonodoro kiun mi sentis en Vjetnamio de hieraŭ. Oni bruligas ĝin por kuirado ĉe strato.

KS

Ni alvenis al la Kongresejo. La kongresejo estis bela kaj granda konstruaĵo. Parolis s-ro Hori al mi ke tiu konstruaĵo estas duonregistara domo. Unue okazis kurso de la vjetnama lingvo. La vjetnama lingvo estas tre malfacila. Mi memoras nur du vortojn; “saluton” estas “xin chào” kaj “dankon” estas “kamon”. Kaj vespere ni vidis vjetnaman dancon kaj kanton en koridoro de la kongresejo. Sed neniu klarigis kiuj estas la dancistoj kaj la kantistoj, kaj kion ili kantis. Post la enigma danco kaj kanto okazis mod-parado per tradiciaj vestaĵoj. Mi

VORTOJ

flug-haven-o Noi Bai ノイバイ空港 (ハノイの国際空港) **flar-i** (においを) 感じる **fum-odor-o** 煙の匂い **el-aviadil-iĝ-i** 飛行機から降りる **mal-strikta** 緩い **dong-o** ドン (ヴェトナムの通貨単位) **trakt-i** 取り扱う **fam-ŝajn-a** 有名な **du-on-for-ir-i** 去りかける **re-don-o-mon-o** おつり **frap-et-i** 軽く叩く **ripoz-i** 休息する **seren-a** 波風のない、落ち着いた **scen-o** 場面、光景 **prokrast-it-a** 遅らされた **guberni-o** 県 **promen-i** 散歩する **vetur-il-o** 乗り物 **motor-ciklo-o** オートバイ **mas-o** 塊 **tru-it-a** 穴を開けられた **karb-o-brik-o** 石炭のブロック

ARTIKOLO

nenion preparis. Sed s-ro Hori kunportis “Happi” . Do li vestis min per ĝi. Sed ne nur ĝi. Li kunportis ankaŭ mongolan ĉapon. Kvankam mi tute ne komprenis mi surmetis la ĉapon sur mia kapo. Apud Young-Long, kiu pozis per korea tradicia vestaĵo mi marŝis per stranga figuro.

Tri foja parolo

En la tria tago mi tri foje parolis antaŭ ĉiuj partoprenantoj. Unue mi parolis malferman saluton kiel reprezentanto de japanoj. Due mi raportis junulara movado de Esperanto en Japanio. Trie mi prelegis pri miaj strangaj vestaĵoj. Kvankam mi preparis la prelegon, pri malferma saluto kaj raporto de la movado mi preparis nenion kompreneble. Do tre embarasite mi apenaŭ parolis. Mi nenion memoras. Alilandanoj parolis diversajn salutojn kaj raportojn. Sed mi tute forgesis pro mia tiama nervozeco. Post diskuto pri ĉeftemo “komunikiloj inter junaj esperantistoj” s-ro Hori prezentis multajn tradiciajn muzikilojn. Dum lia prelego mia koro bategis ĉar post tio mi tuj prelegos. Venis mia vico, kaj mi ekprelegis. Mi parolis vestante per miaj verkoj min kaj du vjetnamojn. Fine ni tri estis kune fotitaj. Mi ne scias, ĉu mia prelego estis bona. Sed mi volas kredi, ke la prelego estis bona.

Riki edziĝis

Dum vespermanĝo Riki hazarde najbariĝis kun vjetnama junulino Nepo. Mi ne scias komencon. Sed ĉiuj ekbruis



Partoprenantoj de KS. 18 partoprenantoj el 4 landoj



La verkinto (la plej alta persono) kaj partoprenantoj kun la vestaĵoj de la verkinto.

ke Riki kaj Nepo geedziĝu. Ĉar Riki estas komencanto de Esperanto, komence li tute ne komprenis kion ĉiuj diris. Sed poste iu klarigis al li, kaj lia vizaĝo pli kaj pli ruĝiĝis. Li ĉirkaŭpremis sian kapon. Ĉiuj ridegis. Tia ŝerco daŭris ĝis fermo de KS.

Fine

Mi ĝuis vjetnaman vojaĝon. Esperantistoj estas tre afablaj. Manĝaĵoj estas bongustaj. Vetero estas komforta. Mi resentas ke Esperanto estas tre utila. Se oni uzus Esperanton en tutmondo, homa vivo pli riĉiĝus. Por mi senesperanta vojaĝo al alilando estas tre timinda afero. ■

VORTOJ

du-on-reg-ist-ar-a 半民半官の **koridor-o** 廊下
enigm-a 謎 **mod-parad-o** ファッションショー
ĉap-o (ふちなし) 帽子
poz-i ポーズをとる **figur-o** 姿
represent-ant-o 代表者
kompre-n-obl-e もちろん
embaras-it-e とまどって、当惑して **nervoz-ec-o** 神経質さ
bat-eg-i 強く打つ、どきどきする **verk-o** 作品
hazard-e 偶然に
najbar-iĝ-i 隣になる **ek-brui** 騒ぎ始める **ŝerc-o** 冗談
tim-ind-a 怖い、不安な

KS donis memcerton de Esperanto

KUDOU Riki

2010 年 4 月にエスペラントを学び始めた工藤 璃輝さん。8 ヶ月後、思い切って KS に参加しました。その体験記です。

Mi komencis lerni Esperanton en aprilo, 2010. La kialo, pro kio mi komencis Esperanton estas tre malgrava. En mia universitato kurso de Esperanto ekzistas, kaj dum lastjaraj printempo kaj somero mi havis adekvatan tempon por ĉeesti la kurson ĉiufoje, ĉar mi pensis “mi provas elekti la kurson”. Se mi devis elekti alian kurson anstataŭ Esperanta kurso, mi ne povis renkonti Esperanton kaj multajn esperantistojn.

Komence mi ne havis grandan interesiĝon. Sed ju pli mi lernis, des pli mi interesiĝis pri Esperanto. Nu, mi tediĝas pri tio, ke en mezlernejo mi estis lasata lerni mallogikan lingvon, ĝi estas angla lingvo. Ĉar mi emociiĝis, ke Esperanto estas logika tro pli ol la angla lingvo. Tial mi ekŝatis Esperanton.

En iu tago (eble la lasta oktobro), mia instruisto de Esperanto diris al mi,

“Mi volas, ke vi iros al Vjetnamio por lerni Esperanton, ĉar Esperanta kolektiĝo okazos tie” .

Post tre longa konsidero, mi decidis iri al Vjetnamio. Ĉar mi volas fariĝi pli bona parolanto de Esperanto, kaj volas scii, kia lando Vjetnamio estas.

Mia unua vojaĝo de Vjetnamio estis tre amuza. Tie multaj motorcikloj estas. Kaj trafika signalo ne estas uzata, ĉar iri trans vojo estas danĝere. La metodo kiel transiri estas paŝi malrapide, ĉar motoristoj antaŭsupozas la pozicion kie mi estos post kelkaj sekundoj, kaj evitas min. Fari la metodon postulas al mi iometan kuraĝon.

Mi miris, ke vjetnamoj uzas manĝobastonetojn, ĉar mi pensis, ke la popoloj, kiuj uzas manĝobastonetojn estas



En bankedo de la 29a KS

nur ĉinoj, koreoj kaj japanoj. Sed, de indonezianoj, kiuj venis al KS, mi aŭdis, ke indonezianoj ordinare ne uzas manĝobastonetojn. Ĝi estas tre interesa por mi.

En la 29a KS, kelkaj paroladoj kaj eventoj okazis. Mi ne povis kompreni multe, pri kio oni parolis, sed ankaŭ estas tio, kion mi povis kompreni. Unu, junaj esperantistoj ŝajnas uzi interreton lerte. Ekzemple retmesaĝoj kaj “Facebook” . Per ili junaj esperantistoj interkomunikiĝas. Oni povas komuniki de iu loko al malproksima iu loko en tre mallonga tempo, do por esperantistoj kiuj loĝas en diversaj lokoj interreto estas tre bona ilo.

En KS, mi ĝojas, ke oni povas kompreni miajn malbonajn paroladojn Esperante. Mia lernado de Esperanto ne estas sennecesa kaj estas utila! Sed en flughaveno, kvankam mi volis aĉeti pepsikolaon, mi ne povis komprenigi al vendisto kion mi volis aĉeti. Do en ĉi tiu vojaĝo, mi ekhavis memcerton de Esperanto, kaj malekhavis memcerton de la angla lingvo. ■

(La sama enhavo aperis en “La Revuo Orienta” n-ro 1075 : Red.)

VORTOJ

adekvat-a 十分な、相応の **prov-i** やってみる、試みる **ted-iĝ-i** うんざりする **logik-a** 論理的な
emoci-iĝ-i 感激する **kolekt-iĝ-o** 集まり **antaŭ-supoz-i** あらかじめ想像する
manĝ-o-baston-et-o 箸 **inter-ret-o** インターネット **ret-mesaĝ-o** メール



INTERVJUO de Prezidantino de VEJO NGUYEN Hoang Yen

ヴェトナム・エスペラント青年機構 (VEJO) の代表、グエン・ホアン・イェンさんが語る、ヴェトナム初 KS 開催のいきさつ

Yen estas la dekstra. Kun vjetnama partoprenanto. Ŝi hontetis esti sola fotita

Ĉi-foja KS estis la unua en Vjetnamio. Ĝin gvidis prezidantino de Vjetnama Esperanto-Junulara Organizo (VEJO), NGUYEN Hoang Yen. Surprizinde ŝi estas 19-jaraĝa, la plej juna partoprenanto. De tiu ĉi junulino, ni, redakcio, intervjuis pri KS.

Redakcio : *Kiel Vjetnamio invitis KS?*

Yen : Unue mi volas diri, saluton al junaj Esperantistoj kaj ĉiuj. Ni, VEJO fondiĝis en 2004. Lastjare ni partoprenis KS en Nankino, Ĉinio. Mi volis vidi, kiel junaj Esperantistoj en aliaj landoj agadas, uzas Esperanton, ĉar ili spertis okazigi renkontiĝojn. Ni volis lerni iliajn spertojn. Kaj mi volis akiri ŝancon renkonti alilandajn esperantistojn, precipe junajn.

Red. : *Kio estis problemo por okazigi KS?*

Yen : Havi helpantojn kaj homojn por fari ĉiujn. Ĉar nur kelkaj povas bone fari. Mi pensas, ke la plej granda problemo estas, ke ni ne havas sufiĉe homojn. Unuafoje

mi okazigas renkontiĝon. Al mi mankas sperto.

Red. : *Ankoraŭ mankas? Ankoraŭ ne sufiĉis sperto, kvankam VEJO okazigis IJK en 2007?*

Yen : Mi eklernis Esperanton en 2005, kaj mi nur partoprenis du eventojn de Esperanto, nome, IJK en Hanojo, 2007, kaj la 28an KS en Ĉinio. Antaŭe mi mem neniam okazigis iun eventon aŭ programon. La 29a KS estas mia unua programo. Aldone, ĝi estas internacia.

Red. : *Vi tre bone gvidas tiun ĉi eventon.*

Yen : Dankon (rido). Kun bonaj helpoj de aliaj Esperantistoj. Ne nur mi.

Red. : *Ĉu VEJO havas intencon okazigi KS daŭre, po unu fojon en la kvaraj jaroj?*

Yen : Mi ege volas. Sed al ni malkas persono por okazigi. Kaj ankaŭ kiel vjetnamaj esperantistoj problemo estas mono por vojaĝi, kaj ankaŭ tempo. Ni klopodas, sed ankoraŭ ne certas. La movado de VEJO estas ankoraŭ trankvila, ne ege aktiva.

VORTOJ

redakci-o 編集部 **fond-iĝ-i** 創立、設立される **spert-i** 経験する **agad-i** 活動する **renkont-iĝ-o** 会合、集まり **ŝanc-o** 機会 **precip-e** 特に **kvankam...** ...にもかかわらず **al-don-e** その上 **intenc-o** 意向